

persona antologio

noveloj

roberto peres-franko

zirie

La bona profeto

al Baruch SPINOZA

Dio parolis al mi kaj diris: gardu vin kontraŭ tiuj, kiuj diras: Dio parolis al mi kaj diris...

2008

La ĉerizuja floro

*“fali kiel petaloj de floro,
tio estis nia destino”*

TSUBOI Sunao

Li vekigis kaj sciis sin ridanta. Kuŝante sur la herbo li malfermis la okulojn: la ĉerizujo super lia kapo lasis vidi ĉielajn spacojn inter la floraj branĉetoj. Li rigardis al sia flanko, kaj ŝi estis tie, kuntiriĝinta sur la herbo, kvazaŭ ŝi dormus sed kun la okuloj malfermitaj al li. Ankaŭ ŝi ridetis, kaj ŝiaj lipoj ankoraŭ ruĝaj esprimis amon kaj necertecon.

– Ĉu vi amas min? – ŝi demandis sed sciis la respondon.

La duonmalfermita kimono lasis vidi denove ŝiajn porcelanajn ŝultrojn; en la malnodita hararo restis kaptitaj disaj floroj. La grundo estis kovrita de ili. Li karesis ŝian frunton kaj prenis rozan floreteton.

– Ĉu vi scias, kial mi ŝatas ĉi tiun floron? – li diris.

Sed ŝi silentis.

– Ĉar ĝi memorigas min pri vi.

Ŝi ridetis kaj mallevis la rigardon. Akihiro tiam aŭdis mildan zumadon – ĉu eble abelo ĉe la flora arbopinto? – kaj poste akran siblon. Li rigardis al la proksima urbeto, Hiroŝimo, kaj subita fulmo inundis ĝin.

Li aŭdis nenion. Li sentis nenion. La cindroj kovris la bruligitajn
ebenaĵojn.

2006

La profetaĵo

al Pedro RIVERA

Kiĉireja, la plej respektinda el la sorĉistoj kuevaj¹, kiun la legendo supozigas senmorta, enspiras la fumon de la herbo. Lia mensa okulo malfermiĝas kaj vidas la dancon de l' Dio.

Estintaĵoj, estantaĵoj kaj estontaĵoj, ĉio ekaperas antaŭ tiu ĉi okulo. La tribestro demandas koncerne sian regadon. Fininte la respondon, la orakolo estas nun preta por lia parulino.

– Kiuforma estas la mondo? – ŝi demandas.

La veron oni montras al ŝi:

– La mondo estas senfina maro – respondas Kiĉireja – kaj en ĝia mezo estas elmariĝinta terpeco kun formo de jadvokolora jaguaro.

La brusto de la kueva reĝino malkvietiĝas.

– Kiom da sunoj daŭros nia regado?

La sorĉisto, en ekstazo, asertas:

– Sekiĝos la senfina maro antaŭ ol ĉesos ekzisti la nobeleco de via gento.

1. *Cueva*: Amerika indiana popolo, kiu loĝis en la orienta parto de Panamo

La reĝino denove ridetas. Ŝi stariĝas kaj paŝas al la granda kabano, lasante post si la murmureton de la konkoj pendantaj de ŝia maleolo. La malsata rigardo de la sorĉisto sekvas ŝin.

En la lazura horizonto, rigardata de neniuj, la karaveloj de Bastidas ekaperas sur la marondoj, en la nebulo, kun kruco kaj glavo.

Li venigas la marsekiĝon...

2006

Pri kiel la 17a ĉapitro ne estis la lasta

al Enrique JARAMILLO LEVI

Venkita, kuŝanta sur la grundo proksime de la morto, la kavaliro la sis sian kapon kliniĝi flanken. Li povis vidi kiel lia maljuna ĉevalo klo podas eskapi, kompatinde forgalopante de la rabobesto, tamen mal sukcese. Pretere, sur monteto kies kurba konturo videblis kontraŭ la vespera ĉielo, li kredis vidi la neklarajn figurojn de du rajdantoj, kiuj same klopodis eskapi. Li palpis siajn vizaĝon kaj barbon. Li vidis, ke la mano sangokovriĝis. Li volis stariĝi aŭ almenaŭ turni sin flanken sed ne povis. Li sentis leĝerecon en la kapo, kiel okaze de dormemo, kaj li komprenis, ke lia vivo estas foriranta. “Vidu kia malfeliĉo fine venas al mi”, li malforte murmuretis. “Helpu min en tiu ĉi malfeliĉa horo, kara mia”. Freŝa vento de okcidento skuis la reĝajn flagojn kaj la branĉojn de anzino¹.

La plumo subite haltis. Apogante sin sur la skribotablo, la viro fermis la okulojn kaj per la montrofingro masaĝis la lacajn palpebrojn.

1. *encino*: verda kverko, ileks-kverko

Nekonata sento, kvazaŭ malĝojo aŭ melankolio, ŝvebis en la brusto. Li rigardis tra la malfermita fenestro. Malpuraj infanoj ludis per lignaj glavoj en la strateto. Estis vespere. La iom fora voĉo de kriisto distris lin dum momento. Li stariĝis kaj rigardis la faskon da paperfolioj kuŝantaj sur la tablo. Li denove sidiĝis. Io ankoraŭ mankas, li sentis. Io ne estas en la ĝusta loko. Li prenis la lastan folion el la fasko kaj ŝiris ĝin. Poste li metis en alian lokon de la fasko la antaŭajn kvar foliojn. Li denove pretigis la plumon.

La kavaliro malfermis la okulojn. Sur la monteto aperis la figuroj de la du rajdantoj. Li levis la rigardon kaj vidis la leonon salti sur lin kaj forigi per la unĝegoj la vundojn sur lia korpo, kaj poste la besto dorsen kuris en la kaĝon, kie ĝi trankvile kuŝiĝis. Li sentis, ke lia korpo estas ĵetita supren, en la aeron, kaj la doloro malaperis. La maljuna ĉevalo galope revenis, ankaŭ malantaŭen, kaj kapriole metis sin sub lian korpon. La armaĵo ne bruis, kiam li falis sur la selon. La ĉevalaĉo kaj la rajdanto restis kvietaj antaŭ la ĉaro de la leonoj. La memoro pri la feroĉa atako malaperis. Levante la rompitan vizieron, Donkiĥoto rigardis la leoniston, kiu atendis lian respondon. Vento de okcidento skuis la flagojn.

Al la ĝardeno

al Rogelio SINAN

– Pasintnokte mi songis pri ŝi.

– Denove – veis la patrino, klinante la kapon kaj krucsignante sin.

La patro silente rigardis sian filon, kiu sidis ĉe netuŝita telero da cerealo. Post longa paŭzo li demandis:

– Kion ŝi diris ĉifoje al vi?

– Ke vi ne zorgu pri ŝi. Ŝi diris, ke panjo devas ne plu plori, ĉar ŝi bone fartas.

La patro rigardis la patrino, kiu kuntiris la brovojn kvazaŭ pardonpete. Senpacience, li stariĝis, kisis al la aero super la kapo de sia edzino kaj metis sian manon sur tiun de la filo. Li surmetis la jakon, prenis tekono kaj eliris el la domo.

– Al via paĉjo ne plaĉas, ke vi parolas pri tiaj aferoj.

– Kion signifas “ateisto”? – demandis la infano.

La patrino silentis.

– Vi devas iri al la lernejo – diris la patro. – Mi ne volas, ke vi malfru.

La sekvan matenon la gepatroj matenmanĝis en silento kaj de tempo al tempo ĵetis oblikvan rigardon al la filo.

– Pasintnokte mi songis pri ŝi.

– Ĉu vi komprenas min nun? – diris la patro. – Vi devas alkonduki lin hodiaŭ. Psikologo povos helpi lin. Ni ne povas resti kun krucitaj brakoj, farante nenion, kaj lasi lin kreski tia.

La patrino senvorte jesis per malĝoja gesto. Ŝi volis demandi ion al la filo sed tion ne faris.

– Mi diris al ŝi, ke vi ne kredas min. Ŝi diris, ke mi diru tion al panjo: la tagon, kiam ŝi mortis, okazis io bela, kiun nur ili vidis.

– Vi ne estis tie – interrompis la patrino subite ruĝiĝinta.

– Mi estis en la lernejo. Paĉjo ankoraŭ ne venis el la laborejo. Sed ŝi estis tie. Tiun tagon vi ambaŭ estis solaj en la domo. Ŝi diris, ke ŝi sentas grandan doloron, kaj tiun tagon ŝi komprenis kial. Ŝi klarigis al mi, ke la vivo estas kiel lernejo: oni venas, lernas kaj foriras. Ŝi sciis, ke ŝi lernis sian lecionon kaj ke tempas foriri.

La patro, kolera, stariĝis, movis la tablon kaj elprenis ledan zonan.

– Sufiĉas – li kriis. – Tiun ĉi kanaĵlon mi tuj edukos.

Li prenis la infanon je la brako kaj komencis zonbati lin.

– Estis papilio tie! – ploris la infano.

La patrino haltigis la patran brakon kaj genue antaŭ la infano demandis:

– Kion pli ŝi diris al vi?

– Ke tiun matenon la papilio eniris tra la fenestro en la ĉambron kaj flugis al ŝia brusto. Ŝi vidis ĝin, panjo, kvankam ŝiaj okuloj estis fermitaj. Ŝi diras, ke ankaŭ vi vidis ĝin, ke vi ĉesis plori kaj kviete rigardis la papilion milde movi la flugilojn ĝis ĝi endormiĝis. Ŝi diras, ke la respondo al via demando estas: jes. Ĝuste en tiu momento ankaŭ ŝi endormiĝis.

– La papilio mortis – veis la patrino.

– Ŝi diris al mi, ke vi metis la papilion en ŝian ĉerkon, inter ŝiajn manojn.

– Vi ne estis tie.

– Ŝi vidis ĉion – insistis la infano. – La papilio estas tie, apud ŝi. Pasintnokte ŝi montris ĝin al mi. Ŝi diris, ke vi ne kredos min. Ŝi petis, ke mi kunportu ĝin, por ke vi kredu min.

La infano elpoŝigis lignan skatoleton, kaj el ĝi prenis senmovan papilion. La patrino paliĝis ekvidinte ĝin.

– Ĝi mortis, ĉu vi ne vidas? – pafis la patro.

– Ŝi diris, ke vi prenu ĝin, kiel en tiu tago.

La patrino tuŝis la papilion, kiu tuj ekmovis siajnflugilojn. Flagrante sub la matena suno, kvazaŭ eta anĝelo kiu eliras el abismo”, ĝi flugis tra la malfermitan fenestron al la ĝardeno.

2005

La trovaĵo

al Ariel BARRIA

Kiam ni malfermis la malantaŭan pordon de la kamioneto, tie estis ili: pakaĵoj sur pakaĵoj, volvitaj en plasto kaj glubendo. La ŝoforo saltis el la kamioneto kaj klopodis eskapi, sed la kolegoj de la alia policaŭto persekutis kaj alpafis lin, kiam li rifuzis halti. Dum la preterpasantoj gape rigardis la ulon morti sur la pavimo, mi estis paralizita pro la granda kvanto da drogo, kiu estis antaŭ mi en la ŝarĝaŭto.

– Dio mia.

Je rapida rigardo, mi kalkulis proksimume tunon kaj duonon da bonega drogo. Poste, la Direktoro de la Polico oficiale anoncis la pezozon: 1615 kilogramojn da pura kokaino. Oni gratulis nin en la policejo kaj fotis nin dum manpremado inter ni kaj la Direktoro, kun la standardo de la Policoficejo en la fono. “Ekzemplaj oficiroj”, li diris. Mi eĉ ne pensis klare, premate de la grandeco de la trovaĵo.

Tiun nokton, enlite kun mia edzino, mi ankoraŭ havis la damnitajn sakojn en la kapo.

– Vi tremas – diris al mi mia edzino. – Kio okazas?

Mi ne povis respondi. Mi dormis eĉ ne minuton: la okuloj restis malfermitaj la tutan nokton, rigardante mian edzinon, la bebon dormantan en la lulilo, la krucon pendantan sur la mizeraj muroj de la

mizera domo, kie ni loĝis, kaj por kiu mi pagis metante mian vivon en riskon ĉiutage.

– Granda bonsorto trafis nin hieraŭ, aĥ? – diris al mi Pako, kiam mi eniris la policaŭton la sekvan tagon.

Mi alrigardis lian vizaĝon kaj vidis, ke li seriozas. Pako havis la okulojn ruĝaj, kaj lia elspiro odoraĉis je malmultekosta alkoholaĵo. Certe li maldormis la tutan nokton, fortrinkante la cent dolarojn, kiujn la Polico donis al ni premie pro la granda kvanto da drogo konfiskita. Li aspektis honeste feliĉa pri la tuta afero. Ŝajnis al mi, ke Pako vidas ĝin kiel grandan okazaĵon, favoran al sia kariero, kaj kiel bonan ŝancon por inviti siajn amikojn al senpagaj drinkaĵoj.

– Ĉu vi pasigis bonan nokton? – sarkasme mi demandis al li.

– Diablan! – li respondis.

– Drinkado kun amikoj kaj dancado kun junulinoj?

Surprizita de mia tono, li diris:

– Kaj nun, kiu fek' estas via problemo, frato?

– Pako... – mi diris al li, balancante la kapon. – Vi havas eĉ ne nebulan ideon pri tio, kion ni faris hieraŭ.

– Nian laboron! – li respondis, kun surprizo.

– Tio estas tro da kokao, Pako. Tro. Ni ne estu tiel bonaj. Al iu grava krimulo mankas nun tuno kaj duono da kokaino, kaj mi certigas al vi, ke tiu ruzulo ne estas kontenta pri ni.

Pako subite iĝis sobra kaj jam ne ridetis.

– Ĉu vi ne vidis hazarde hieraŭ veturilon malrapide pasi preter via domo, pli ol unu fojon?

Li rigardis min, kvazaŭ klopodante memori. Subite, li malfermegis la okulojn.

– Damnu min! Fek', fek' al...

Li klinis la kapon kaj premis sian vizaĝon per la fingroj, kvazaŭ skrapante la okulojn.

– Ĉu vi kredas, ke ili scias kie mi loĝas?

Mi ne povis respondi al li. Sed mi sentis, ke respondo ne necesas.

– Ni estas mortintaj, kolego, ni estas finitaj – plendis Pako, maltrankvile.

– Trankviliĝu. Ni devas nur esti zorgemaj de nun. Tenu la okulojn bone malfermitaj kaj fidu nenion. Ĉu vi komprenas? Neniun. Ĉio glate iros.

– Ĉu vi estas certa? – li demandis min, kun larmoj sur la vangoj.

Mi rigardis tra la fenestro. En preterpasanta policaŭto, policano kun malhelaj lensoj rulis suben la vitraĵon de fenestro kaj levis la manon, kvazaŭ por saluti nin. Mi malkroĉis la revolveringon kaj kontrolis la ŝargilon: ses bronzkoloraj kugloj dormis en la malvarma karuselo. Aŭdiĝis milda klako de perkutilo.

– Ĉu vi estas certa? – denove demandis Pako, pli trankvile.

Sed mi jam ne povis plu mensogi al li.

2008

Destino

al Julio CORTAZAR

*“Unu vivon poste ni komprenos,
ke la vivon ni perdis nur pro timo”*

Juan Pablo SILVESTRE

Luisa neniam komprenis, kial ŝi mortis. Dum la grandega muelila ŝtono, blinda ĉe sia eterna akso, daŭrigis la cirklan iradon nenien, ŝiaj okuloj perdis la brilon fikse kaj senhelpe rigardante la brakon. La antaŭan vesperon, la suno, kiel momenta lampiro en tre profunda puto, brilis en tiuj samaj okuloj. Sidantaj sur la teraso de ŝia domo, Luisa kaj ŝia amikino Lucia babilis. Ili parolis pri amo, sekso, estonta vivo. Kaj ili ridis – ho, Dio, kiom ili ridis!

– Ĉu vi scias? – diris Lucia. – Mi decidis iri ĉivespere al la maljunulino, por ke ŝi legu mian manon.

La mieno de surprizo de Luisa ne surprizis Lucian.

– Tiu freneza maljunulino ne atingos, ke li rimarku vin.

– Sed ŝi povas diri, ĉu iutage li faros tion. Kial vi ne venas kun mi?

Esprimo de nekredemo rapide aperis sur ŝia vizaĝo: “Mi ne kredas je tiaj aferoj”.

– Kompreneble ne... – akceptis Lucia. – Sed ĉu vi ne sentas scivolemon? Oni diras, ke antaŭ ol vi naskiĝas via vivo estas jam skribita tie, en la linioj de via mano.

Ili eksilentis. Ankaŭ dum la noktiĝo, unu apud la alia, ili silentis dum la maljunulino frotis la maldekstran manon de Lucia. Ŝi plentente rigardis ĝin kaj fermis la okulojn: ŝi parolis longe pri vivo, amo, sano, mono. Luisa ektemis ĉe ĉiu vero, kiun la maljunulino diris pri ŝia amikino. Intimajn aferojn, sekretojn inter ili du: ĉion ŝi vidis. Post kiam la maljunulino finis la laboron pri Lucia, Luisa antaŭsentis, ke ŝia vivo ŝanĝiĝos. La ciganino prenis ŝian maldekstran manon, forte kunpremis la lipojn kaj restis silenta longan tempon. Poste ŝi rigardis ŝiajn okulojn, kun bedaŭro.

– Sed vi ne kredas je ĉi tio, mia kara...

– Kion vi vidis, sinjorino? – postulis Luisa kun rompita voĉo.

Angoro longigis la mallongan paŭzon, ŝajnigante ĝin senfina.

– Estas pli bone, ke vi foriru kaj forgesu ĉion – diris la maljunulino sciante, ke ŝi ne faros tion.

“Diru al mi jam, je Dio”, ŝi petegis, kaj la maljunulino fermis la tristajn okulojn, maltrankvila. La polmo de ŝia mano, seka kiel maldika cepoŝelo, apenaŭ tuŝetis la ŝvitan manon de Luisa.

– Okazos tre baldaŭ, mia kara. Estas skribite ĉi tie, ekde la unua tago.

Silento. Larmo falis sur la nudan kaj tremantan manon, malfermitan al la ĉielo. “Diru al mi kiam”, insistis Luisa, kaj alia larmo falis sur ŝian manon, kiam ŝi aŭdis la respondon. “Kion mi povas fari por eviti tion, oldulino?”

– Detruu ĝin, se vi volas vivi. Dum la mano ekzistas, via sorto estas tia.

La ŝtono turniĝadis, malrapide kiel la mondo, antaŭ ŝiaj velkintaj okuloj kaj palaj lipoj. Tiumatene la suno varmigis tiujn lipojn, survoje al la preĝejo. La irado lasis al ŝi tempon pensi pri sia edzo, sia eta filino,

pri la aliaj gefiloj, kiujn ŝi volis venigi en la mondon, pri la genepoj, kiujn ŝi volis vidi ludi ĉirkaŭ ŝi.

Ŝi sentis, ke la vivo foriras el ŝia brusto. Ŝi ne alvenis al la preĝejo. La muelilo kun svingiĝantaj aloj, kiun ŝi trovis survoje, similis al la bildo de ŝia sonĝo: la aloj blankaj; la pordo malfermita; la ŝtono pigre turniĝanta sur la grenoj; la interno malplena; la suno disradiana inter la fendoj de la tegmento, kiel aro de anĝeloj falantaj en abismon.

Ŝi kontemplan la senĝenan turniĝon de la ŝtono dum unu horo. Neniu aŭdis ŝian krimon, kiam ŝi enmetis la manon. La membro tuj malaperis en fajna ruĝa pasto ŝmiriĝinta sur la ŝtonplato. Paralizita pro la doloro, Luisa dorsfalis kun la stumpo levita al la ĉielo kiel mortinta branĉo. Kun la okuloj fikse rigardantaj la amputitan brakon, ŝi sangis ĝismorte sen kompreni, kio okazis. Blinda antaŭ la agonio, la muelila ŝtono plu turniĝadis la tutan vesperon, imitante la persistemon de la somera vento. La krepusko senĝene finiĝis, senatenta pri la trista bildo de la senmova korpo kun la maldekstra mano kompleta, kaj kun la dekstra brako tranĉita kaj vertikala.

2005

Kronado

Vestita per ora brokaĵo kaj ruĝa silko, la juna heredanto atendas. Malantaŭ la ĉizitaj palisandraj muroj, li aŭdas la voĉon de sia Majstro. La investituro daŭris du horojn, inkluzive de tuta horo por aranĝi liajn longajn harplektaĵojn kun la krona drako. La pordo malfermiĝas, kaj la Majstro salutas lin per eta riverenco.

“Dum dek du jaroj oni vin pretigadis, Chao-Ping, por ĉi tiu tago. Vi jam majstras la sciencojn kaj artojn de regado, diplomatio kaj politiko. Sed antaŭ ol vi povos aliri la tronon de via patro, vi devas lerni kvin esencajn lecionojn, kiuj bone utilos al vi dum via reĝado.”

La larĝa kurteno el virga silko falas, kaj la juna heredanto ekvidas antaŭ si iluzian spegulon de bildo, kiu moviĝante perfidas, ke ĝi ne estas lia propra. Aliulo, kun la samaj aĝo, figuro kaj vizaĝo, same vestita kun la mantelo kaj juveloj de la Imperio, kontemplas lin vidalvide, mirigita.

“Kiu estas vi?”, ili ambaŭ demandas, preskaŭ unuvoĉe. La Majstro diras, kun brakoj malfermitaj al ambaŭ: “Unua leciono: la Imperiestro scias, ke estas respondoj kiuj alvenas nur kun la tempo.”

Per sia ligna bastono el seka ĉerizujo, la Majstro frapas la pordon: du eĉnukoj alportas malgrandan tablon, kun tabulo preta por ludado. Simpla gesto sufiĉas, por ke ambaŭ junuloj sidiĝu unu fronte de la alia, silente. Dum unu horo aŭdiĝas nur la milda klakado de la ŝtonetoj sur la ligno. Silentaj demandoj interkruciĝas super la ardezaj kaj konkaj

ludpecoj. La aliulo, maltrankvila, ekscias, ke malvenko baldaŭas, kaj li rezignas per subtila kapjeso. Ambaŭ stariĝas.

“Bela kaj malfacila batalo”, laŭde diras la Majstro. “Dua leciono: la Imperiestro trankvile pripensas sian strategion.”

Alia perbastona frapo revokas la eŭnukojn, kiuj venas kun du glavoj. La venkito kiel la unua elingigas la sian, kaj Chao-Ping defendas sin. La ĝemoj de la klingoj plenigas la ĉambron. Post streĉa batalo la aliulo falas: la glavo de Chao-Ping minace premas kolan vejnon, kie pulsas la sango.

“Nobla kaj furioza batalo! Tria leciono: la Imperiestro scias liberigi kaj moderigi sian forton”.

“Kiu li estas, Majstro?”, denove demandas Chao-Ping. La Majstro silentas, do la aliulo respondas: “Mi estas Chao-Kiang, sola filo de la forpasinta imperiestro Ying-Chao, kaj heredanto de la trono.” Malnodita harplektaĵo sorbas liajn larmojn. “Neeble”, flustras la kronprinco. “Mi ne havas gefratojn. Mi kreskis sola en la norda alo de la palaco, ĉiam sciante min heredanto”. Ambaŭ rigardas, agititaj, la Majstron, kiu anoncas: “Kvara leciono: Estas veroj tiel profundaj, kiujn eĉ la Imperiestro ne scias.”

En la salono, de malantaŭ la pordego de la ĉambro aŭdiĝas la vokoj de la Mil Ministroj, kiuj atendas la Imperiestron kaj lian kronadon.

“Vi montris, Chao-Ping, per via saĝeco kaj forto, ke vi estas inda filo de via patro. Estas la momento fari tion, kio farendas”, diras la Majstro. Sed Chao-Ping ne moviĝas. Kun sia glavo ankoraŭ pikanta la karnon de la alia li demandas: “Mi volas scii ĉu vi estas mia frato. Se vi estas mia frato, mi volas, ke vi venu kun mi kaj estu mia konsilisto. Se vi estas mia frato...” La alia esploras kaj plendas al la Majstro: “La trono estas mia... de ĉiam. Vi perfidis min. Kiel mi povus akcepti esti simpla konsilisto de ĉi tiu trompanto?”

“Kvina leciono: la Imperiestro zorge elektas siajn konsilistojn”, la Majstro diktas.

Post eksono de la bastono kontraŭ la pordo, du gardistoj eniras kun nigra mantelo, kaj prenas la venkitan knabon, kiu estas envolvita kaj trenita eksteren, al la suda limo de la Palaco. “Se vi estas mia frato, indulgu mian vivon”, li krias dum li estas forportata. Kiam la voĉo perdiĝas malantaŭ la rozkoloraj kolonoj, la granda pordego malfermiĝas kaj la Mil Ministroj stariĝas. Chao-Ping, pala kaj ŝvita, por la unua fojo vidas la tronon en la salono lumigita de ruĝaj lampoj.

“Dum dek du jaroj mi lernis sub viaj zorgoj, Majstro, pretiĝante por ĉi tiu tago. Mi neniam pridubis vin aŭ vian lojalecon al la Imperio. Diru al mi nur unu aferon, Majstro... Diru al mi ĉu li estis mia frato aŭ iu trompanto, ankoraŭ alian el viaj lecionoj.”

La Majstro faras mildan riverencon kaj invitas lin iri antaŭen. “Ne plu estas lecionoj, Via Dia Moŝto. Chao-Ping estas la nova imperiestro.”

2011

Pri la aŭtoro

Roberto PERES-FRANKO [es: **Roberto Pérez-Franco**] naskiĝis en Panamo en 1976 kaj komencis lerni Esperanton en 1998. Li diplomitiĝis kiel elektromekanika inĝeniero en 2001 en UTP (Panamo), kaj magistriĝis pri loĝistiko en 2004 kaj doktoriĝis pri inĝenieriaj sistemoj en 2010, ambaŭ en MIT (Bostono). Inter 1993 kaj 2008 li aperigis kvin novelarojn kaj tri kolektojn de rakontoj, poemoj kaj eseoj, ĉiujn en la hispana. Li gajnis la Nacian Novelan Konkurson *José María Sánchez* en Panamo en 2005. Tradukoj de liaj verkoj aperis en la antologio *Mondoj* kaj en *Beletra Almanako*. Li loĝas en Melburno, Aŭstralio.

roberto.perez-franco.com

Pri la tradukisto

Norberto DIAS GEVARA [es: **Norberto Díaz Guevara**] naskiĝis en Kubo en 1959. Li diplomitiĝis kiel elektro-inĝeniero en 1985 en la Centra Universitato de Las Villas *Marta Abreu*. En tiu sama jaro li komencis lerni Esperanton. Li estis redaktoro de *Avanco*, la organo de Kuba Esperanto-Asocio. Li tradukis diversajn artikolojn, kiuj estis libroforme publikigitaj de Monda Asembleo Socia (MAS). Li estas membro de la skipo de E-tradukantoj de *La Monde Diplomatique* kaj membro de la redakto-teamo de *Monato*. Li loĝas en Sancti Spiritus, Kubo.